REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 4 (35) septembro 2006*

en la numero

alvoko al la Ago-Tago
rakontoj kaj impresoj pri UK-91, RET-06, OkSEJT-46, ISLA k.a.
neesperanta rusia eldonejo eldonis kvar priesperantajn librojn
tragike forpasis Sergej Bozin
aperis dudiska kantokolekto de Mikaelo Povorin
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2006

enhavo:

01 Alvoko al la Ago-Tago en 2006
02 Rezolucio de la 91-a UK
02 Francoj plejmultis en Florenco
03 Rusianoj en UK
04 Buntaj kongresaj impresoj
07 Blindula kongreso en Florenco
07 Infana kongreseto
08 RET-06 apud Volĵskij
09 Rezultoj de OkSEJT-46
09 Impresoj pri OkSEJT
11 Varma loko, varma kompanio...
14 La gejunuloj revigliĝas
16 Valeria
17 Internacia Somera Lernejo en Armenio
19 Memore pri Sergej Bozin...
21 Decidoj de la 22-a Konferenco de REU
21 Kion REU faris en 2005-2006
23 Pri la instru-metodika laboro
24 EK MASI dum la jaro
26 Jarlibro 2006 aperis
27 Novaj REU-aliĝoj
27 Forpasis Aleksandras Masjukas kaj Sergej Bozin
27 Kotizoj de REU por 2006
28 Gratulo por Aleksandr Osokin
28 Svetlana Gonĉarova defendis magistran disertaĵon
29 IJK en Sarajevo
29 Salutvorto de la nova TEJO-prezidanto
30 Zamenhofa semajnfino en Kaliningrad
30 Herzberg – oficiale Esperanto-urbo
31 Centjariĝo de ISAE
32 La novaĵoj de ILEI
33 Vikipedio en Esperanto kreskas
34 OSIEK Konferenco en Rumanio
35 Raporto pri BET-42
35 ELNA kongresis en Novjorko
37 41-a Brazila Kongreso de Esperanto
38 Kongreso de SAT
38 Novaj planoj por malnova kontinento
39 Boatado 2006
39 Mondvojaĝanto en Ukrainio
40 Esperanto en terapio
41 Germana Esperanto-Kongreso
41 Ĉiĉeronoj en Esperanto
41 Litovio respondis adekvate
42 7-a Internacia Himalaja Renkontiĝo
42 Jubileo de "Juneco"
43 Turneo tra Francio
44 Pri la tombo de Lena lebedeva
45 Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA
45 La 9-a eldono de la Zamenhofa Hamleto
46 Ampleksa DVD pri Esperanto
47 Novaj eldonaĵoj de UEA
47 9-a Internacia Fotokonkurso
48 Novaj libroj de "Sezonoj"
49 Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj
49 Leksikono pri Esperantlingvaj verkistoj
49 Novaj esperantaĵoj en Ukrainio
50 Stranga kunigo, aŭ kirasŝipo inter bestoj
54 Ĉifritaj zamenhofaj proverboj
55 Ivan Franko – biografia skizo kaj versaĵoj
22, 25, 28, 33, 40 Anekdotoj
k3 Aperis kantokolekto de Mikaleo Povorin
k4 Neesperanta eldonejo eldonis kvar E-librojn

Sergej Bozin

tragike pereis la 20-an de aŭgusto

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 4 (35) septembro 2006

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti representaj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2006:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 180 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 18 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

ESPERANTO NE KONAS LANDLIMOJN

Verŝajne, multaj muzikŝatantoj memoras, ke tiel nomiĝis albumo de la legenda rok-grupo "Amplifiki", eldonita en 1989. Ĉu la legendo revenas?! Ne… Bedaŭrinde ne…

Temas pri io alia. Kiel jam estis anoncite antaŭe, la dudiska kolekto de miaj kantoj aperis! La diskoj ricevis la vortludajn titolojn "Verula sezono" kaj "Revula sezono". Por la atento de muzikŝatantoj estas proponataj 40 kantoj, plejparte originalaj. En la diskoj estas kolektitaj ne nur la plej sukcesaj, ŝatataj kaj ofte plenumataj kantoj, sed ankaŭ la kantoj, por kiuj jam delonge ne restas loko en la koncertoj, sed kiuj ja meritas atenton ("Revenas bela tempo", "Al stelo", "Vi kaj mi", "Sonorilo", "Jam tempas" k.a.). "Ĉio nova estas bone forgesita malnova". Kaj, certe, en la diskoj estas ankaŭ tute novaj kreaĵoj, kiujn ankoraŭ neniu aŭ preskaŭ neniu aŭdis: ekzemple, "La pluvo" kaj "Por kio" laŭ la vortoj de la moskva E-poetino K.Ilutoviĉ. Interalie, notindas, ke du novaj kantoj estas komponitaj laŭ la vortoj de famegaj Esperantaj klasikuloj: la lirika "Stranga danco" (J.Baghy) kaj la petole sprita erotikaĵo "Miss Esperanto" (R.Schwartz).

Lastmomente, kiam la diskoj jam estis preparataj al la eldono, aperis interesa ideo: registri du kantojn duete kun Nataŝa Gerlaĥ. Des pli ke precedenco de nia kuna kantado jam estis antaŭ 6 jaroj dum KEF en Helsinko. Mi kaj Nataŝa registris "Mian karan amikon" kaj "Pli bonas" sen forlasi la urbojn, kie ni loĝas: mi – Moskvon, kaj Nataŝa – Stokholmon. Dankon al Ĵomart pro la bonega registrado de ŝia ĉarma voĉo! Ni interŝanĝis faritajn sondosierojn interrete. Poste Aleksandr Moskovcev, moskva soninĝeniero, kiu registris Esperantajn kantistojn por la lastaj partoj de la kompaktdiska serio "Oraj kantoj", kunigis la sondosierojn komputile. Jen, aŭdu – nova internacia dueto! Kiel estas dirite: "Esperanto ne konas landlimojn." La kovrilpaĝojn preparis la eldonejo "Impeto": Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko helpe de Vjaĉeslav Te, la pentristo, kiu jam ornamis per siaj bildoj kelkajn librojn, eldonitajn de "Impeto".

kantado dum UK en Florenco

Mi esperas, ke la rezulto plaĉos al la esperantistoj en Rusio kaj aliaj landoj. Agrablan aŭskultadon!

Mikaelo Povorin (Moskvo)

Kvar libroj – danke al unu informa kampanjo

Unu el la plej gravaj rusiaj librokompanioj "AST" eldonis kaj dissendis al vendejoj tuj **kvar** E-librojn. La libroj jam estas aĉeteblaj en Moskvo kaj aliaj rusiaj regionoj, ĉefe en la librovendejoj de la vendeja reto "Bukva". Ĉiuj kvar aperis kun "provaj" eldonkvantoj po 2 mil ekzempleroj.

La novaj libroj estas:

– "Страна Эсперантия. Карманная энциклопедия" (La lando Esperantio. Poŝenciklopedio"), prezenta libro pri Esperanto; la aŭtoro – Nikolaj Gudskov. *"Такой страны, в которой говорили бы на языке эсперанто, на карте мира вы не найдете. Но в то же время такая страна есть, в ней живут и по ней путешествуют тысячи людей. И неважно (или на самом деле как раз важно!), что ее жители рассеяны по всему свету: страна с таким названием заслуживает того, чтобы о ней знали, чтобы о ней можно было прочитать в путеводителе и, в конце концов, чтобы туда действительно можно было съездить."*

– "Элементарная грамматика эсперанто" (Elementa gramatiko de E-o), de N.Gudskov.

– "500 самых важных слов эсперанто" (500 plej gravaj vortoj de E-o), de N.Gudskov.

– "Эсперанто за один месяц" (Esperanto dum unu monato), de Irina Gonĉarova.

La evento estas aparte tre signifa por nia lando, ĉar lastan fojon neE-a rusia eldonejo eldonis relative grandkvante E-lernolibron en 1992, kaj la lernolibroj, etkvante eldonitaj de rusiaj E-eldonejoj, preskaŭ neniam atingis la vastan publikon.

Indas noti, ke la fruktodona kontakto kun la libroeldonejo "AST" aperis dank' al speciala kampanjo de Rusia E-ista Unio, kiu fine de la pasintjara somero dissendis al dekoj da rusiaj libroeldonejoj inviton konsideri publikigon de E-lerniloj.

Andrej Grigorjevskij,
prezidanto de REU